


Kara vizitanto!

Ni bonvenigas vin en nia preĝejo "Petrikirche", la hejmo de la evangelia-luterisma komunumo Petri-Nikolai en Freiberg. Nia paroĥan komunumon karakterizas intensa agado kun infanoj kaj gejunuloj, aktiva kunlaboro de la anoj en la koruso, en domaj rondoj kaj aliaj grupoj kiel juna komunumo, aĝulaj rondoj kaj diversaj muzikaj prezentaĵoj.



Preĝeja interno: Certe vi jam rimarkis la eksterordinare modernan ornamon de la interna spaco. La ĉefa navo samtempe servas por diservoj, festoj kaj kiel granda komunuma salono. Sub la jubeoj troviĝas komunumaj ĉambroj, ekz. por la kristana instruo de infanoj, la gejunula ĉambro kaj la muzikĉambro. Ĉi tie ilustre sin prezentas la ideo de la "preĝejo en la preĝejo". Kuirejo kaj pliaj grupaj ĉambroj kompletigas la tuton. En la iama korusa ĉambro ofte okazas diversaj ekspozicioj.

Esencajn partojn de la interno, ekz. la orgenan eksteraĵon kaj la ambonon, kreis Johann Christian Feige (la pliaĝa) post la granda urba incendio en 1728. El liaj pliaj meritoj menciindas la skulpta ornamo de la Dresdena "Frauenkirche". Theodor Quentin en 1896 konsiderinde ŝanĝis la internon de nia preĝejo. De 1974 ĝis 1986, konekse kun la unuiĝo de la urbcentraj komunumoj St. Petri kaj St. Nikolai, la interna preĝejo ricevis sian nunan formon.

La artisto **F**riedrich **P**ress (1904–1990), vaste konata pro siaj aranĝoj de sakralaj konstruaĵoj, inter la jaroj 1974 kaj 1986 ornamis la internon de nia preĝejo. La po ses skulptaĵoj sub la jubeoj, prezentantaj la "atendantan komunumon", rigardas al la altaro kaj la granda figuro ĉe la vitra muro: "La revenanta Kristo kiel reganto de la mondoj" (Off. 20). La artisto mem al la skulptaĵo direkte al la ĥorejo, prezentanta Kriston kiel suferantan diserviston, donis la titolon "La lasta krio" (Jes. 52, 13–).



Orgeno de Gottfried **S**ilbermann: Plian specialaĵon vi vidas sur la okcidenta jubeo. La orgenon de nia preĝejo Gottfried Silbermann (1683-1753) finkonstruis en la jaro 1735. Je tiu ĉi instrumento Silbermann unuafoje realigis la maturiĝintan koncepton de la malfrua periodo de sia kreado, kiu kongruis kun la solena, fundamenteca tembro de la malfrua baroko.

La orgeno kun 32 sonantaj registroj estas la plej granda du-klavara orgeno de Silbermann. Post ŝanĝoj en la 19-a kaj la 20-a jarcento oni en la jaroj 1993/94 parte restarigis ĝin al sia origina stato. La granda finrestaŭrado en julio 2007 redonis al la orgeno sian malnovan muzikan pompon. Tiu ĉi orgeno estas ideala, nacie kaj internacie multdezirata instrumento por la interpretado de verkoj de la baroka tempo ĝis la tempo de Felix Mendelssohn-Bartholdy. De majo ĝis oktobro ĉiumerkrede tagmeze okazas orgenludado de la Silbermann-orgeno. Vi kompreneble povas mendi orgen-prezentadojn aŭ etajn koncertojn por konferencoj aŭ privataj okazaĵoj.



Konstruaĵo kaj **S**onoriloj: La paroĥa preĝejo St. Petri estis konstruata antaŭ la jaro 1190 sur la plej alta loko de la urbcentro, iama juĝejo, kiel romanika baziliko, kies restaĵoj plu videblas en la ĥorejo. Per sia alta situo kaj la riĉe gradigita, baroka kufo de la okcidenta turo, finiĝanta per longa pinto, la preĝejo esence formas la silueton de la urbo. La grandan, 3850 kilogramojn pezan sonorilon Oswald Hilliger muldis en la jaro 1487. La etan sonorilon kun siaj 1940 kg estis farita de lia nepo Wolf Hilliger en la jaro 1570, ambaŭ desur la en 2005 restaŭrita kampanilo vokas al la diservo. La pli eta horsonorilo kaj la ministra sonorilo plurfoje tage aŭdeblas.

Turoj: Je fiksaĵoj kaj ankaŭ laŭ interkonsento ni ofertas gvidadon kaj ascendon sur la turon, kiu – 72 metrojn alta – estas la plej granda turo de la Freiberga malnova urboparto.

Por pliaj demandoj ni kompreneble volonte estas je via dispono. Pastro Tetzner atingeblas rete: pfarrer@petri-nikolai-freiberg.de aŭ telefone: +49 3731 247859, la dungitoj de la preĝejo atingeblas je 34188. Ampleksan prezenton de nia komunumo, informojn pri la konstruaĵo, la orgeno ktp., planojn pri diservoj kaj aranĝoj vi trovas je www.petri-nikolai-freiberg.de!

